# NAJBARA FOLIO

Redaktas kaj eldonas Klubo de Esperantistoj en Krzeszowice n-ro 1/2000

*Karaj legantoj, iun printempan posttagmezon dum ĉiuvendreda kluba renkonto naskiĝis la ideo eldonadi suplementon al la „Apudvistula Bulteno". Ni geklubanoj el Krzeszowice intencas tiamaniere pli forte akcenti nian partoprenon en la vivo de krakova Esperantistaro, informante pri agado de nia klubo kaj rakontante samtempe pri nia regiono, ĝia historio, homoj, antikvaĵoj, naturo kaj turismaj atrakcioj. Kiam ni rigardas ĉirkaŭen, montriĝas kiom da eksterordinaraj eventoj kaj aferoj plenigas kartojn de la loka historio. Ĉie belegas naturo, ĉie ni malkovras spurojn de nia historio kaj nia identeco. Pro tio, kiel ni esperas, nia intenco certe meritas, por ke ni iom okupiĝu pri ĝies efektiviĝo.*

*Nia klubo estas filio de Krakova Societo Esperanto kaj funkcias dank' al afabla patroneco de direktoro de la loka Kulturcentro, s-ro mag.Maciej Liburski en lokalo de K.O.K. Galerio. Niaj klubaj renkontoj (al kiuj Vi ĉiam estas kore invitataj) okazas ĉiuvendrede je la 15 ĝis 17 horo. Nia modesta rondo kalkulas 10 personojn. Ni renkontiĝas kune pli ol 3 jarojn. Dum tiu tempo ni organizis jam komunajn ekskursojn al Baltiaj Esperantaj Tagoj: 1997- Haapsalu, Estonio, 1998- Veisiejai, Litovio, 1999- Liepaja, Latvio kaj ĉi jare ni denove vojaĝos al Tallinn. Ni partoprenis en 83 UK en Montpellier kaj en 84 UK en Berlin. Unu el niaj klubanoj vizitos baldaŭ Mielno-n por aktive ripozi dum la 22 Internacia Feriado.*

*Niaj ĉarmaj koleginoj gvidataj fake per s-ino Maria Rybacka kantas kune esperantajn kanzonojn kaj deklamas esperantajn versaĵojn.*


*Baldaŭ, la 18-an de junio ni povos atingi la pinton de Czantoria por ke jam la 75. fojon ekamikiĝi kun fratoj –ĉehoj. La 23-an de junio ni planas dediĉi al poezio de Lidia Ligęza. La Aŭtorino promesis ĉeesti!*

*Pri aliaj agoj ni laŭdos nin en venontaj „Folioj".*

*Sur la dua paĝo de nia aldonaĵo ni publikigas la artikoleton de Anna Ewa Sołtys pri rozoj de Tenĉina Ĝibo. La aŭtorino, juna magistrino pri biologio ĉiceronas nin tra la montetoj kaj arbaroj de nia regiono, riĉaj interalie en endemia , vegetabla regno. Se Vi tamen vagante tra herbejoj kaj ĝuante aromon de sovaĝaj rozoj, hepatikoj kaj anemonoj, trovos kanistrojn de biero, plastikajn botelojn, diversajn malplenajn ujojn, pripensu, ke faris tion ankaŭ turistoj.*

LA PAROĤA PREĜEJO AL SANKTA MARTENO EN KRZESZOWICE

Freŝe renovita reakiris antaŭan brilon ĝuante okulojn per siaj proporcioj kaj harmoniaj dimensioj. La preĝejon oni konstruis en 1832- 1840 laŭ la projekto de Karl Schinkel, famkonata germana arkitekto kaj pentristo. AL atento precipe meritas la frontono farita de sabloŝtono kun rozetforma vitralo kaj figuroj de kvar apostolojn. Interne skuas okulojn multkoloraj altaroj konstruitaj el italaj marmoroj kaj valoraj bildoj de Santi di Tito kaj Leopold Kupelweiser, aĉetitaj pere de Artur Potocki.



## TRA ROZA ITINERO DE TENĈINA ĜIBO (GARB TENCZYŃSKI)

Verda maro de arbaroj kaj florabundaj herbejoj – tiel ĝenerale oni povas priskribi landvidaĵoj de Tenĉina Ĝibo, la lokon de miaj vagadoj inter sovaĝa naturo.

Unuan fojon mi renkontis matenruĝe brilantan rozon sur apudvoja herbejo. Eĉ gia nomo distingas ĝin de aliaj plantoj. Sapfa, la antikva, helena poetino nomis ĝin „ allogo de Arkadio" kaj „ pupilo de floroj". Ekzistas multnombra diverseco de noblaj rozvarioj. Ofte ni admiradas ilin en apudhejmaj ĝardenetoj.. Ili ravas nin per kolornuanca riĉeco kaj diversdimensiaj floroj, modelitaj laŭdezire de rozkultivistoj, Kreskantaj apud ili sovaĝaj rozoj ŝajnas aspekti malriĉe kvazaŭ cindrulinoj, Ili havas tamen aliajn avantaĝojn: ĉarmon, purecon, simplecon kaj ankaŭ kortuŝan belecon rezultantan de ilia fragileco kaj efemereco. Ni povas konvinkiĝi pri tio vagante dum majaj posttagmezoj tra limpadoj, herbejoj kaj kalkroketoj.

Sur la teritorio de Tenĉina Ĝibo troviĝas sep el dek ses indiĝenaj rozospecioj.Ilia floradperiodo okazas fine de majo kaj komence de julio.La plej disvastigita specio estas **Rozo sovaĝa** (Rosa canina) kun blankaj aŭ iomete rozaj petaloj, reflektantajn printempajn sunradiojn. Karakterizas ĝin granda diverseco de fruktoformoj kies ruĝa koloro kontrastas de la herbeja, autuna flavgrizo. Ili estas ovoformaj, rondaj, piroformaj au oblongaj. Precipe multe da sovaĝaj rozoj ni povas renkonti ĉe kampvojoj laŭlonge de la teraltaĵo „Cantoria" en Miękinia kaj sur „Debrużka" en Filipowice. Ĉi tiujn lokojn ni povas nomi rozarioj kreitaj pere de naturo, temploj de la mita diino Rodante (gr. Rhodon – rozo). Ni povas trovi tien ankaŭ **Rozon grizbluan** ( Rosa dumalis ) kies ruĝiĝitaj ŝprosoj distingiĝas sur la malhelverda fono de arbaro kaj **Rozon kampan** ( Rosa agrestis) kun blankaj, iomete rozigitaj petalapeksoj de floroj – kvazaŭ tuŝitaj pere de sunsubira radio.

Unu el plej misteraj lokoj estas Ĥrosna Teraltajo ( Wzgórza Chrośnieńskie) en la rezervejo Popówka. Sur la montetoj kreskas arbustaro, roza arbustaro, konsistanta el kunplektitaj arbustoj de **Rozo rustkolora** ( Rosa rubiginosa ), flamantaj per purpuro de petaloj kaj allogantaj per forta aromo de maturaj pomoj. Dum admirado de ĉi tiu rozejo, la vortoj de verkistino Gertruda Stein igas vere trafaj. Ŝi skribis: „ Rozo estas rozo, estas rozo, estas rozo...".

Sur teritorio de la agretoj „ Roketoj" (Skałki) en Tenczynek oni povas trovi la plej rarajn rozojn. Sur fono de la blankaj ĵurasroketoj ĉe la sablaj padoj kreskas **Rozo haroza** ( Rosa tomentosa). Ĝi fieras per siaj grizbluaj- verdaj folietoj kaj karnokoloraj florpetaloj.

La alia larĝe disvastigita specio estas **Rozo krispa** ( Rosa rucjosa). Ĝi ne estas nia indiĝena specio. Ĝi devenas de Asio kaj apartenas al vere unikaj naturverkoj. Kreskante ĉirkaŭe de la vilaĝo Baczyn, dum florado kreas vere skarlatan maron. Ĝi mirigas nin ankaŭ aŭtune kiam sur la fono de krispaj, oranĝaj – flavaj folioj montriĝas ruĝaj, brilantaj fruktoj.

Decas mencii ankaŭ pri **Rozo barila** ( Rosa dumetorum) kiu floras blanke kaj helroze, kreskanta en densejoj kaj deklivoj sur la tuta tereno de nia ĉirkaŭaĵo.

Mi esperas, ke mi instigis vin , por ke vi haltigu ĉe iu rozarbusto kreskanta ie sovaĝe interkampe kaj enrigardu en iliajn disfloritajn pupilojn.

Anna Ewa Sołtys